# Ekzercoj por VENUS' LA FINA VENK' --- Sceno naŭ

Rimarko: por solvi la taskojn, unue legu la naŭan scenon de la teatraĵo ***Venus' la fina venk'***. La teksto troviĝas en la LERNILOTEKO.

## 1) VORT-DIFINOJ

*Ligu la vortojn el la scenoj kun konvena difino. Vi havas du nebezonatajn difinojn, nur por malfaciligi vian tagon. Nedankinde!*

Unua parto

| | |
|---|---|
| 1. plando ------ -------------- | A. ĉevale tirata ĉaro |
| 2. eterna -------------------- | B. eksipliko |
| 3. komencanto ------------------- | C. fari truon en la tero (aŭ en Venuso!) |
| 4. klarigo ------------------- | Ĉ. interpunkcia signo |
| 5. akademio ------------------- | D. katastrofo |
| 6. citilo ------------------- | E. la suba parto de ŝuo |
| 7. fiasko ------------------- | F. lingvo-kontrola komitato |
| 8. favora ------------------- | G. mallongdaŭra |
| 9. kvereli -------------------- | Ĝ. malprogresinto |
| 10. fosi -------------------- | H. pozitiva |
| | Ĥ. senfina |
| | I. vorte disputi |

## 2) UNU EL KVAR

*Jen frazoj aŭ demandoj pri la sceno. Sed mankas vorto aŭ vortoj aŭ respondo. Vi jam imagas la ludon! Ni proponas al vi kvar alternativojn, el kiuj nur unu estas ĝusta. Elektu tiun!*

**1. La ĉefa novaĵo el Venuso estas ke ________**
a) ĉiu tie parolas Esperanton.
b) tie estas tre varma vetero.
c) Deb kaj Trev kreis novan lingvon.
ĉ) Deb kaj Trevo kreis novan esperantiston.

**2. Klari iom komprenas la parolojn de Deb kaj Trev ĉar _______**
a) ŝi sekvis rapidkurson de Venuspuk.
b) ŝi sekvis rapidkurson de TrevILo.
c) ŝiaj eternaj komencantoj tiel parolas.
ĉ) ŝi estas telepatia.

**3. El Venuspuk oni ne forigis ______**
a) ĉapelitajn literojn.
b) literojn x, q, w kaj y.
c) akuzativajn problemojn.
ĉ) majusklajn literojn.

**4. En la nova Venuspuk ______**
a) la Akademio kreos kaj rigore kontrolos la regulojn.
b) reguloj ne eksistos.
c) ruĝkrajonaj redaktoroj regos la lingvo-evoluon.
ĉ) la parolantoj kreos la novajn regulojn dum ili parolas.

**5. 'Plumyeu' kaj 'avek' kaj 'beuku' venis en Venuspukon el la ________ lingvo.**
a) franca
b) itala
c) hispana
ĉ) volapuka

**6. Kiam Mart diras ke la ŝutelefono sonas laŭplane, Miko aldonas "__________".**
a) Laŭplanke
b) Laŭplante
c) Laŭplande
ĉ) Laŭplende

**7. Laŭ Mart, kion faris Deb al Trev?**
a) Konvinkis lin.
b) Konvertis lin.
c) Konvenis al li.
ĉ) Konversaciis kun li.

**8. Kial devas esti multaj esceptoj en Venuspuko?**
a) Ĉar ĉiuj naciaj lingvoj estas escepto-plenaj.
b) Ĉar ili ne konas pli regulan lingvon.
c) Por la intelekta stimulo.
ĉ) Por la erotika stimulo.

**9. Oskar ofte ___________.**
a) kverelas
b) varbas
c) instruas
ĉ) prognozas

**10. Kuŝas en ruinoj ilia tuta ________.**
a) statuto
b) strategio
c) starpunkto
ĉ) statistiko

## 3) MIKSITAJ VORTOJ

*Jen kelkaj vortoj el la sceno. Sed la literoj estas miksitaj. Malmiksu ilin kaj skribu la vortojn en la korespondaj spacoj aŭ kvadratoj. Fine, prenu la literojn kiuj sidas en la kvadratoj kaj rearanĝu ilin por malkovri la kompletigon de la kaŝ-frazo sube. En malmultaj kazoj (tre malmultaj!) ni kompatas vin kaj jam donas literon, sed nun tamen ne temas pri tia helpo.*

| | |
|---|---|
| K I A S O F | _ _ □ _ □ _ |
| R E V E L K I S | _ □ _ □ _ □ _ _ |
| L U D I P E R F O | □ □ _ _ _ _ _ □ _ |
| R A S P O L A | □ □ _ □ _ _ _ |
| D I A B L E | _ _ □ _ _ □ |
| O S T A L U N | □ _ _ □ _ _ □ |

Kiun deziron dividas Klari pri siaj kursanoj kaj la esperantistaro kiu komunikas sur tiu fora planedo?

_ _ _ _ _   _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ _ **O**.

## 4) DEMANDOJ

1. Kiun surprizon havas la esperantistoj kiam ili parolas kun Deb kaj Trev?
2. La esperantistoj apenaŭ komprenas ilin. Ĉu vi komprenas ilin?
3. Kiumaniere ilia lingvo diferencas de Esperanto? Donu almenaŭ kvar respondojn.
4. Kial Klari pli bone komprenas ilin ol la aliaj?
5. La kreo de nova lingvo surbaze de Esperanto okazis ne nur sur Venuso. Rakontu kion vi povas pri la tera okazo.
6. Kiuj lingvoj influis la evoluon de Venuspuk? Donu ekzemplojn.
7. Deb kaj Trev faris lingvo-rilatajn ŝanĝojn kaj tamen ne estis pure lingvaj. Kiujn?
8. Kio regos kaj ne regos la lingvo-evoluon de Venuspuk?
9. Kio laŭ vi ĉefe regas la lingvan evoluon de Esperanto sur la tero?
10. Kio estas la fina evoluo en la progreso de Venuspuk?

**Daŭrigota. Serĉu la ekzercojn preparitajn por la aliaj scenoj.**
**La solvojn vi povas peti en retmesaĝo ĉe la redaktanto@edukado.net.**